

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet ♦ kesäkuu ♦ junio ♦ 3/2002



*Aini Vääräniemi kun sia diplomo Aganto de la jaro.
(Foto: Irja Miettinen)*

Aŭtunaj Tagoj, p. 19 ♦ Osmo Buller, p. 6 ♦ Liisa Viinanen, p. 4
Valamon kurssien ohjelma / Programo de Valamo-kursoj, p. 16



Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Päätoimittajaa etsitään, yhteydenotot puheenjohtajalle (Anna Ritamäki, yhteystiedot alla)

Ĉefredaktoro serĉata, kontaktu la prezidanton (Anna Ritamäki, kontaktinformoj sube)

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 13,50 •/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 10 •; Baltio 10 •, aliaj landoj 13,50 •.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Anna Ritamäki*

Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ anna.ritamaki@kolumbus.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri: *Tiina Oittinen*

Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ tiina.oittinen@pp.inet.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Heikkinen, Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ annaliisa.heikkinen@surfeu.fi

Eila Martin, Intiönpolku 4 as. 36, 90100 Oulu. ☎ (08) 374 697

Synnöve Mynttinen, Koskenniskantie 5 D 39, 48400 Kotka. ☎ (05) 260 1326

Jukka Noponen, Viipurinkatu 27 A 12, 00520 Helsinki. ☎ (040) 5915767 ☎ (09) 1483871 ✉ jukka.noponen@iki.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Irja Miettinen, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta. ☎ (05) 453 0653 ✉ irja.miettinen@WWnet.fi

Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, 69440 Lestijärvi. ☎ (06) 863 7351 ✉ raitapy@jymy.kase.fi

Eero Rinta-Karjanmaa, Poppelikatu 11-13 A 24, 15520 Lahti. ☎ (03) 783 4448

Kasisto/Rahastonhoitaja: *Anna-Liisa Heikkinen*

Asiakkaankatu 2 G, 00930 Helsinki. ☎ (09) 343 1449 ✉ eafkasisto@esperanto.fi

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800017-230825.

Officejo/Toimisto: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

Ĉefdelegito de UEA/ UEA:n pääedustaja: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Pankkitili/Bankkonto: Sampo 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Pozitivaĵoj kaj plibonigindaĵoj

En la unua plenlonga estrarkunsido (eble superlonga, pli ol kvinhora) ĉiuj ĉeestantoj prezentis sin mallonge en la kunteksto pozitivaĵoj kaj plibonigindaĵoj en EAF. La tasko estis: menciu du aferojn pozitivajn en EAF kaj unu aferon kiu bezonus plibonigon.

Inter pozitivaĵoj estis menciitaj multaj gravaĵoj ofte pritraktitaj kiel evidentaj. Ni posedas oficejon, kiu estas aktive prizorgita (marda deĵorado, purigado, ordigo, biblioteko...) kun bazaj ekipaĵoj funkciaj kiel telefono kaj kopiilo. Ni havas aktivulojn kiuj prizorgas bazajn aferojn, aperas la gazeto, estas prizorgataj la librotenado kaj la membroregistro. Ekzistas Fondumo Esperanto en Finnlando kaj EAF havas kun ĝi bonajn rilatojn.

Ankaŭ menciigis pli spektaklajn atingojn. Ni spertis plurfoje kiom nin famigis en Esperantujo nia kapablo okazigi grandajn internaciajn renkontiĝojn sukcese. En Finnlando kun internacia famo okazis IJK 1980, KvinPinta Semajno 1990, UK 1995, KEF 2000 kaj pluraj internaciaj kursoj kaj aliaj aranĝoj. Tiuj ne nur famigas nin eksterlande. Ili ankaŭ signifas konatecon en la propra lando. Pliaj estas instigataj eklerni aŭ plulerni pro tia inspira evento. Verŝajne kontribuas al la sukceso ke ni relative malofte invitas grandskalajn eventojn al nia lan-

do kaj sekve povas bone prepari nin. Se ekzistas entuziasmo ni okazigas kun entuziasmo. Se tia volo ne ekzistas, ni ne okazigas nur pro la devo. Tamen ankaŭ tradicioj gravas, kiel Vintraj Tagoj kaj Aŭtunaj Tagoj, foje pli sukcese aranĝitaj, foje malpli, sed ĉiam kunigantaj agantojn de pluraj regionoj en Finnlando.

Plurfoje menciigis la pozitivaĵo kompetentaj funkciuloj, sed ankaŭ la manko de ili, manko en kvanto, sed ankaŭ en kvalito. Ja profesinivelaj spertuloj pri organizaj temoj ne povas esti multaj, kiam ĉiuj agadas libertempe kaj libervole. Novaj talentoj feliĉe aperadas. Speciale ĝojiga estas la kultura kontribuo de la gejunuloj, muzike kaj alimaniere.

Aliaj aferoj plibonigindaj estas i.a. informado, instruado (ĝenita de manko de instruistoj) kaj kontaktoj inter la kluboj tutlande (ĝenita de malgranda nombro de aktivuloj). Cetere ni povus lerni multon pli pri financa mastrumado. Ni povus atingi pli da subvencioj, sed ne nur ricevi ilin, sed ankaŭ sukcese utiligi tiun monon por antaŭenigo de la movado atentante la longdaŭran perspektivon, ke ni havu kontentajn aktivulojn, novajn kaj malnovajn membrojn, kiuj volonte pluagadas.

A M Ritamäki

Ekflamiĝis nova Esperantostelulino

Unu el la plej interesaj kaj bonaj distraj programeroj dum mia Esperantovivo estis dum la Vintraj tagoj en Mikkelo, la opero por unu virino *Duraj sortoj napolaj*. Liisa Viinanen estas tiu unu virino kaj ŝi jam faris grandan laboron por pretigi la operon. Ŝi mem skribis tekston, kiu rakontas pri napola geedza paro Rozina kaj Alfredo kaj ilia bebo. Frakasas ilian hejmon la alveno de kamentubisto. Sekvas kvereloj, post kiuj Rozina foriras al Sicilio. Tie Rozina konatiĝas kun juna viro

Manolo. Rozina kaj Manolo enamiĝas, sed tio ne signifas, ke ĉio estus bone. Sekvas teruraj aferoj, pri kiuj la opero rakontas.

Liisa Viinanen elektis por sia opero vere konatajn ariojn kaj kantojn, i.a. de Verdi, Rossini kaj Puccini, ekde la ario de Laureta ĝis la kanto *O sole mio*. Nur etaj ŝanĝoj pli kunigis la tekston al la rakonto. Ĉar estis kelkaj roloj en la opero, sed nur unu kantisto, Liisa Viinanen devis kanti la rolojn de sopranulino, baritonulo, tenorulo kaj kontraltulino.



De maldekstre: Hanna-Leena Kalaoja kaj Liisa Viinanen kaj la baleta ĥoro: Riitta Hämmäläinen, Katja Lampinen, Pipsa Ahonen, Mikko Mäkitalo kaj Eeva Vaijärvi kun Anja Karkiainen. (Fotoj: Pentti Makkonen)



Programkajero prezentis la rakonton kaj la kantotekstojn en Esperanto kaj, por ebligi ankaŭ al neesperantistoj kompreni, en la finna.

Por mi estis interese aŭdi ŝian kantadon denove, ĉar mi aŭskultis ŝin jam en januaro dum la ŝtata konkurso de solkantado en Lappeenranta. Tie ŝia kantado ĝojigis la publikon. Pri ŝia voĉo skribis la kritikisto de Helsingin Sanomat i.a.: "... la voĉmaterialo promesas evoluon al grandioza drameco ...". Ĝuste pro tio ŝi gajnis specialan premion pro rara voĉmaterialo. La loka kritikisto de Etelä-Saimaa menciis: "... en ŝia voĉo estus pli da tono kaj efiko, se ĝi povus pli libere elflui ...". En ŝia voĉo vere estis ia streĉo, kiu eble efikis tiel, ke ŝi ne gajnis lokon en la finalo, kie la konkurantoj kantis operariojn kun orkestro. Bedaŭrinde! Ĉar en Mikkeli mi povis konstati ke la opera kantado vere taŭgas al ŝi. La prezento estis gaja surprizo al mi. Nun la voĉo venis tute libere, kaj ankaŭ ŝi mem videble ĝuis la kantadon. Tiel dum la opero naskiĝis agrabla distra etoso, ĝuste kiel ŝi planis. Ankaŭ sentiĝis, ke la prezento plaĉis al la publiko, ankaŭ al tiuj, kiuj ne kutimiĝis aŭskulti ordinarajn operojn.

Granda merito por la sukcesa prezento apartenas ankaŭ al la akompanistino, pianistino Hanna-Leena Kalaoja. Same la bon-

humora baletgrupo, ŝafinaro kun la vira bovino, estis ĉarma.

La Esperantan tekston kontrolis Riitta Hämmäläinen, kiu ankaŭ kun Anja Karkiainen tradukis Esperanten la ariojn. La tradukaĵoj estis vere bonaj, ĉar tiel bone sonoris la arioj.

Espereble ĉi tiu Esperanta premiero ne estis ankaŭ la lasta prezento. Ĉu eblus, ke la kongresa publiko venontjare en Gotenburgo povus spekti la operon!? Espereble Liisa Viinanen kaj Hanna-Leena Kalaoja povus havi tie propran koncerton kaj muziki en la Internacia vespero!

Tion mi esperas, ke Liisa Viinanen, kvankam ŝi eble restos eksterlande, ne forgesu nin, finnajn esperantistojn. Ĉiuokaze ŝajnas, ke ŝin atendas interesa estonteco; ŝi ja sciopovas du internaciajn lingvojn: Esperanton kaj kantadon!

Jorma Toropainen



Reveno al Finnlando

EL: Bonan tagon, samlandano Osmo Buller. Esperantistoj jam scivolas pri via nova laborejo, Päätalo-instituto. Ĉu vi bonvolus ion rakonti al ni?

OB: Ĝi estas fondita en 1990 kaj nomita laŭ Kalle Päätalo (1919-2000), eble la plej populara finna verkisto de la lastaj 30-40 jaroj. Ĝia sidejo estas en Taivalkoski, lia (kaj mia!) naskiĝloko kaj ĝi laboras por trejni kaj apogi ĉiujn, kiuj deziras disvolvi siajn verkopablojn. Krome ĝi organizas plej diversajn kulturajn aktivaĵojn, konkursojn kaj ankaŭ iom eldonas.

EL: Kiom da homoj la instituto dungas?

OB: Ĝi havas du plentempajn dungitojn kaj dekon da fakuloj, kiuj laboras de tempo al tempo kiel kursgvidantoj kaj konsilas studentojn ankaŭ inter la kursoj, precipe tiujn, kiuj laboras super romano aŭ alia pli granda verko.

EL: El kio konsistas via laboro?

OB: Kiel direktoro mi respondecas pri la planado kaj gvidado de ĉio, pri kontaktoj kun similaj institutoj kaj organizaĵoj, ankaŭ eksterlande, kaj kun komunumaj, ŝtataj k.a. publikaj instancoj. Kaj mi devas trovi la monon...

EL: Kion oni povas studi ĉe vi kaj kiom longaj estas la kursoj?

OB: Simple dirite, oni povas studi literaturan verkadon de ĉiu ajn ĝenro: poezio, prozo, teatraĵoj ktp, ankaŭ ne-fikcio. La kursoj ĉefe okazas semajnfine, dum feriaj sezonoj ankaŭ tutsemajne. Mi nun okupiĝas pri planado de trijara studkompleto, kiu startos ĉiujare en oktobro.

EL: Ĉu via instituto estas ankaŭ internulejo kaj ĉu ĝi havas malĉeestajn studentojn? De kie venas la studentoj kaj kiom ili aĝas?

OB: Dum la kursoj ĝi ja estas internulejo, ĉar oni studas kaj loĝas kune. La studentoj venas el la tuta lando kaj el preskaŭ ĉiuj aĝ-grupoj. En la trijara kompleto malĉeesta studado grave rolos, ĉar ni utiligos la eblojn de interreto kaj retpoŝta kontakto inter la studentoj kaj gvidantoj. La kursoj okazas ne nur en Taivalkoski sed ankaŭ aliloke, eĉ en Svedio kaj Ruslando.

EL: Kiajn temotagojn, festojn ktp. la instituto okazigas?

OB: Mi menciui nur la du plej grandajn. En julio okazas Päätalo-semajno, kultura festivalo kun kelkmilo da partoprenantoj. Al infanoj estas dediĉita la novembra "Napero"-semajno, t.e. Etula semajno, kies kulmino estas la publikigo de la rezultoj de nia tutlande fama fabelkonkurso.

EL: Nova dungito ofte havas novajn planojn. Ĉu vi estas "nova balailo", kiu eble pliligos la ligojn inter Esperanto kaj Päätalo-instituto?

OB: Jes, kaj espereble post iom da tempo mi povos proponi ion al UEA, ILEI kaj la verkista asocio EVA. Kiel oni scias, nia fabelkonkurso jam havas Esperanto-branĉon. Cetere, ankaŭ en siaj unuaj jaroj la instituto havis esperantistan "balailon", Reima Rannikko, delegito de UEA en la najbara komunumo Suomussalmi.

EL: Bonvolu mallonge priskribi la verkiston, kies nomon la instituto portas.



**Osmo
Buller.**

OB: Kalle Päätalo kreis enorman aŭtobiografian romanserion, kiu en sia speco fakte estas la plej ampleksa en la mondo. Ĝi estas kulturhistorie eksterordinara registraĵo de la popola vivo en nia regiono ekde la 20-aj ĝis la 50-aj jaroj. Apartan valoron ĝi havas kiel lingva registraĵo.

EL: Miascie neniu lia verko estis esperantigita. Ĉu kelkaj haveblas en aliaj lingvoj? Ĉu eblus trovi iun por esperantigo aŭ ĉu la vivo kaj medio priskribitaj de li estas kompreneblaj nur en Finnlando?

OB: Tri romanoj aperis en la angla kaj po unu en la estona, maria kaj sveda, sed pri esperantigo mi apenaŭ esperas. La problemon pri komprenebleco por homoj en alia medio oni tamen troigas. Ĉiam io restas nekomprenbla kaj nekaptebla – eĉ por samlandano – sed ankaŭ la verkoj de Päätalo enhavas ion ĝenerale homan kaj homo el alia medio ankaŭ povas esti fascinata de io en ili, kio preterglitas finnan leganton.

EL: Kaj nun pli persone. Reveninte Finnlandon, ĉu vi trovis nian landon ŝanĝiĝinta?

OB: Jes, multe. Eĉ bieron oni nun rajtas trinki sur strata teraso, por doni banalan ekzemplon. Finnlando fariĝis tre eŭropa lando, kaj mi ĝojas, ke ĝi estas tre progresema multlatero. Rilate la lingvon mi iom postrestis kaj eĉ devas konsulti vortaron por kompreni iujn novaĵojn. Kelkaj modaj vortoj cetere estas tute stultaj, same kiel ofte okazas pri neologismoj en Esperanto.

EL: Taivalkoski situas en nord-orienta Finnlando maldense prilokata. Ĉu vi sentas vin izolita kaj ĉu la longaj distancoj malhelpas al vi?

OB: Nek nek. Ĉar mi naskiĝis kaj kreskis ĉi tie, ĉio estas al mi normala. Mi preferas arbojn al urboj kaj ŝatas ne havi tro da homoj ĉirkaŭe, precipe se ili estas vanaj babilantoj, kiaj ĉi tie malpli multas.

EL: Ĉu vi jam konatiĝis kun la esperantistoj de Taivalkoski?

OB: Jes, baldaŭ post mia eklaboro ili venis al mia oficejo por bonvenigi min per Esperanto-kanto. Kun Aini Vääräniemi mi krome tuj ekokupiĝis pri la organizado de Aŭtunaj Tagoj de EAF en Taivalkoski en septembro.

EL: Kiuj finnaĵoj mankis al vi eksterlande?

OB: Ĉefe mankis al mi finna pano. Ĉio cetera por mi malpli gravas.

EL: Kaj kio nederlanda mankas al vi nun en Finnlando?

OB: "Broodje haring met uien", t.e. haringo kun bulko kaj ceperoj, kaj la atmosfero de Roterdamo, kiu vere estas urbo laŭ mia gusto.

EL: Dankon, Osmo Buller, kaj ĝis revido en la Aŭtunaj Tagoj!

Intervjuis Saliko

ENAR kontraŭ rasismo 26.4. en Caisa

ENAR (European Network Against Racism) estas reto por organizoj, kiuj laboras kontraŭ rasismo, ksenofobio, antisemitismo aŭ islamofobio en EU-landoj. La celoj de ENAR estas labori por etne, kulture kaj rase egalrajta, tolerema kaj bunte multflanka Eŭropo kaj forigi rasismajn elementojn el enmigradaj politikoj de EU-landoj. ENAR havas konstantan oficejon en Bruselo kun kvin oficistoj. Esperantistojn certe interesas la informo, ke la respondeculo pri informado estas István Ertl, la eksoficisto de CO kaj eksredaktoro de UEA. Krome ENAR havas landan reprezentanton en ĉiuj 15 EU-landoj. La reprezentanto elektiĝas ĉiujare por unujara periodo en naciaj kunsidoj de "Ronda Tablo", por kiuj popolaj, ne-registaraj asocioj kaj organizoj kolektiĝas por trakti aktualajn rasismorilatajn demandojn, projektojn kaj kampanjojn.

Tia kunsido de "Ronda Tablo" okazis 26.4. en Helsinko, en la internacia kulturcentro Caisa. La kunsidon kunvokis Ihmis-oikeusliitto kaj inter la invititaj popolorganizoj estis EAF. EAFn reprezentis en la kunsido Riitta Hämäläinen. Entute partoprenis la kunsidon ca. 40 organizoj, i.a. Maahanmuuttajien tuki, Suomen nuorisoyhteistyö Allianssi, Kepa, Familia Club, Rauhanliitto, Lastensuojelun Keskusliitto ks. Ankaŭ reprezentantoj de laborministerio kaj ministerio pri internaj aferoj ĉeestis la kunsidon. Same la laborministeria respondeculo pri

minoritatoj (vähemmistövaltuutettu), Mikko Puumalainen. Li neniom parolis dum la tuta 5-hora kunsido. Ĉe-estis ankaŭ Vera Egenberger, la direktorino de ENAR el Bruselo.

La kunsido konsistis el kvin prelegetoj kaj pri la oficila kunsida parto dum kiu oni elektis finnlandan reprezentanton por ENAR-estraro. La paroloj koncentriĝis al leĝaj kaj juraj aspektoj pri rasismo kaj estis tiel tre specifaj kaj ne aparte fruktodonaj por personoj kaj organizoj, kiuj ne rekte rilatas al

juraj aspektoj pri eksterlandanoj. Ni aŭdis i.a. pri la ŝanĝoj en la rajto de enmigrantoj kunpreni familianojn.

La teknikaj aranĝoj de la kunsido estis mizeraj. Dum la du unuaj parolvicoj tute

ne estis mikrofonoj. Tiel oni preskaŭ komplete perdis la parolon de i.a. direktoro Vera Egenberger. La interpretisto por la parolo de Vera Egenberger estis plene neprofesia kaj malkapabla al la tasko. La publiko suferis kaj la horaro fuŝiĝis jam komence tiom, ke pro hasto bedaŭrinde tute mankis tempo por ĝenerala diskuto kaj konversacio inter la organizoj, eĉ por demandoj al la prelegintoj. Mankis ankaŭ paŭzetoj inter prelegoj. Sekve la publiko iradis kaj revenadis. La publiko ankaŭ iom grumblis pri tio, ke oni ne vere parolis pri laboro kontraŭ rasismo, sed pri leĝaj detaloj.

La plej interesa parolvico estis tiu de Timo Makkonen, esploristo el Åbo Akademi. Li esprimis sian dubon pri tio, ĉu per leĝoj oni povas ŝanĝi sintenojn kaj maltoleremon kaj

"Al 34-jara viro ni povas nur doni informojn kaj esperi, ke la informoj ŝanĝos lian sintenon. Sed infanojn ni ankoraŭ povas eduki al apertmenseco kaj toleremo."

forigi rasismon. ”Se oni ekhavirus leĝon pri tio, ke ekde tuj leono kaj ŝafino kuŝas trankvile unu apud la alia, ĉu tiel okazus reale?” li demandis. Li memorigis nin ankaŭ pri la leĝo, kiu malpermesas rasismon ĉe restoraciaj pordoj. Tamen okazadas, ke somalano ne rajtas eniri restoracion aŭ diskotekon pro sia somalaneco. Timo Makkonen substrekis la gravon de libertempa kaj persona agado. Ekzistas leĝoj kaj diversaj edukaj programoj por plia toleremo, sed plej influas la homajn sintenojn kaj antaŭjuĝojn, se ili libertempe agadas kun minoritatoj aŭ eksterlandanoj.

La organizoj povintus anticipe nomumi kandidatojn por la elektoj por ENAR-estraranece. Tamen ekzistis nur du kandidatoj: Silvain Sagne, esploristo, el Suomi-Senegal Seura kaj Ali Quassim (somalano) el Maa-hanmuuttajien tuki. Ĉiuj ĉe-estintaj organizoj havis voĉdonrajton, sed fine oni ne devis voĉdoni. La reprezentanto de Finnlando por ENAR por la jaro 2002 estas



European Network Against Racism
Réseau européen contre le racisme
Europäisches Netz gegen Rassismus

Silvain Sagne kaj la vicreprezentanto Ali Quassim. Silvain Sagne memorigis nin pri tio, ke oni ne laboru nur kontraŭ rasismo, sed ĉiaspeca marĝenigo, ĉu rasa, ĉu seksa, ĉu religia. ”Al 34-jara viro ni povas nur doni informojn kaj esperi, ke la informoj ŝanĝos lian sintenon. Sed infanojn ni ankoraŭ povas eduki al apertmenseco kaj toleremo”, li diris.

Malgraŭ la iom tro specifa enhavo de la kunsido, ENAR certe estas bona kontakto por EAF kaj la kunlaboro estonte frukto-dona.

Raportis: Riitta Hämäläinen

Pliaj informoj pri ENAR: www.enar-eu.org

Diskonovaĵoj

Baldaŭ aperos...

Persone akustike

Elektronika Kompilo kun Dolcxamar

Vinilkosmo informas, ke en la proksima estonto aperos du jam tre atenditaj albumoj.

Persone, la fama sveda rokbanda, havas ja de kelkaj jaroj du diversajn muzikajn vizaĝojn, elektran kaj akustikan. Akustike oni aŭdis Personen jam en multaj renkontiĝoj kaj festivaloj, i.a en KEF2000, sed ne eblis ĝis nun ĝui la muzikon hejme, dediske. Nun, finfine, aperos la longe sopirata *Persone akustike*. La baldaŭ aperonta albumo enhav-

muzike

os i.a la furorajn pecojn *Mi ĉiam kredis kaj Perloj sur la ter’*.

Paralele pretiĝas la albumo *Elektronika Kompilo*, kiu prezentos aktualan elektronikan espomuzikon de diversaj bandoj kaj artistoj el pluraj landoj. Inter la artistoj troviĝas jam konataj bandoj kiel Dolcxamar kaj Solotronik, sed ankaŭ novaj nomoj kiel Magnus el Svedujo. Atenton la fanaro de Dolcxamar: De tiu disko aŭskulteblos la jam famfama *Junaj idealistoj*, *Tempo oportunas* kaj remiksita versio de *Pacman!*

Ambaŭ albumojn vi facile mendos de bone ekipitaj diskovendejoj – kiel la diskejo de FEJO – tuj kiam ili aperos.

Afrikaj lernantoj

La porkomencanta revuo Juna Amiko en sia hejmpaĝo* havas liston pri gelearnantoj togo-landaj, kiuj malgraŭ malsato kaj aliaj malfacilaĵoj vizitadas lernejon sed kiuj dum la paŭzoj hontas kaj suferas, ekzemple pro manko da kunportitaj manĝaĵoj (aliaj kunhavas) kaj manko da mono por kajeroj, skribiloj, lernolibroj, lernejvestoj, ŝuoj aŭ io tia. Leginte artikolojn kaj rakontojn pri tiaj infanoj, publikigitajn kaj verkitajn ekzemple de Gbeglo Koffi, kaj vidinte fotojn pri afrikaj "klasĉambroj" kelkaj ILEI-anoj decidis helpeti. Do, ekzemple Saliko elektis el la listo de JA du knabinojn, Ablavi kaj Meje, parton de kies lernejkostoj ŝi pagu. Ĉio glate iris helpe de la Afrika Oficejo, kaj ŝi jam ricevis 2-3 leterojn de la knabinoj mem dum la lerneja jaro 2001-2002, kvankam la poŝtaĵoj tre malrapide kaj malcerte veturas inter Togo kaj Finnlando. Ni citu leteron de Meje: "Mi pagis 10 kajerojn de 100 paĝoj, 10 kajerojn de 200 paĝoj, ŝuoparon, lernejsakon, bluan kaj ruĝan globkrajonojn, krajonon, bluan lernejbluzon kaj helbrunan jupon, kaj mi pagis por la instruado."

Sen monhelpo Meje ofte forestus de la lernejo, ĉar ŝi devus trovi laboron kaj perlabori la bezonatan sumon. Ŝi estas jam 19-jara. La alia knabino, Ablavi, duonorfino 12-jara, kies patrino mortis kaj pri kiu la patro ne zorgas, skribis post kristnasko: "Tiu ĉi kristnasko al mi estis escepta, ĉar neniam antaŭe mi ricevis donacojn en kristnasko. Mi estas kontenta pro la kuketoj, bobonoj, bak-aĵoj kaj la suko, kiujn mi ricevis pere de s-ro Doumegnon." (Li aĉetis per la sendita mono.) En sia unua letero ŝi skribis, respondante la demandon, kio interesas ŝin, ke ŝi interesiĝas pri "jupo, ŝuoj, vestoj, ĉapelo,


kajero, butero, majonezo, rizo, pano, makaronioj, sardinoj, ovoj kaj salatoj"! Ĉu tio ne montras, ke temas pri vera malsato? Kiu finna knabino trovus tiajn aĵojn menciindaj?

Ambaŭ knabinoj skribas ĉefe en la franca, sed ili jam eklernis Esperanton kaj povas aldoni frazetojn en ĝi. Estas tre interese konatiĝi kun iliaj vivmaniero kaj ĉirkaŭaĵo, kaj ni esperu, ke la leteroj ne perdiĝos. Estas ankaŭ surprize sciiĝi, ke multon ili povas fari per malgranda sumo.

Ĉiam ili dankas Dion kaj citas la Bibliion. Ni lernu ĝoji ankaŭ pri plej malgrandaj aferoj!

*<http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

Meje.



Elämyksiä Pasporta Servolla

19.3. järjestettiin Ranskassa Strasburgissa Euroscola-tapahtuma, jossa oli myös suomalainen esperantonkielinen ryhmä. Euroscola-tapahtuman lisäksi meillä oli mahdollisuus tutustua Pasporta Servoon. Kokoonnuimme ensin matkanjohtajamme Carola Antskogin luo, josta lähdimme 16.3. kohti Pariisia. Pariisissa meitä oli vastassa meidän pariisilaiset Pasporta Servo -majoittajamme.

Täytyy myöntää että majoittajamme olivat todella hyviä tyyppejä ja jos etukäteen hieman jännitinkin sitä, minkälaiset ihmiset meitä majoittavat, niin voin sanoa että se jännitys oli aivan turhaa. Esimerkiksi tämä Monique, jonka luona minä ja kolme muuta ryhmämme jäsentä yöpyi, täytti osansa loistavasti ja teki paljon muutakin kuin vain paikallisen.

Sääntöihinhan kuuluu, että pelkän yösijan antaminen riittää. Tämän lisäksi Monique opasti meitä kaupungilla kertoen eri kohteista, antoi käyttöä kotiaan niin vapaasti, että tunsimme olevamme omassa kodissamme ja ennen kaikkea huolehti, että meillä oli kaikki tarvitsemamme.



Monique on herttainen ihminen, joka majoitti jopa neljä suomalaista matkalla Strasburgiin.

Monique on hyvä esimerkki siitä, että vapaaehtoisuus Pasporta Servossa takaa majoittajien ystävällisyyden; oma halu tehdä jotakin takaa sen, että tekee osansa hyvin. Suosittelemme Pasporta Servoa lämpimästi kaikille, koska se on loistava (ja samalla lähes ilmainen) tapa nähdä toinen kulttuuri.

Jos majoittuisi hotelliin, joutuisi maksamaan kalliin hinnan ja näkisi vain ne perinteiset turistikohteet, joista näkee kuvia kotonakin. Pasporta Servolla majoittuessa taas näkee myös ihmisten arjen ja toisinaan hyvinkin erilaisen tavan elää.

Samalla pääsee tutustumaan uusiin ihmisiin, joiden kanssa voi muodostua hyviäkin ystävyysuhteita. Mainioita ovat myös ne makuelämykset, joita isäntien tarjoama aito paikallinen ruoka tarjoaa.

Meille Pasporta Servo tarjosi ennen kaikkea uusia asioita, upeita kokemuksia ja unohtumattomia hetkiä Pariisissa ystävällisten ihmisten parissa, sillä ilman Pasporta Servoa ja sen suomalaista kontakteja mahtaviin ihmisiin tuskin olisimme Pariisissa käyneet.

Nyt koimme kaksi uutta kokemusta: Pasporta Servon ja Euroscolan. Niistä kelpaa kertoa vielä lapsenlapsillekin.

Paula Niinikorpi, Rauma

Pasporta Servo on vieraanvaraisuusverkosto, joka tällä hetkellä koostuu 1231 isännästä 83 maassa ympäri maailmaa. Liittyäkseksi verkostoon sinun täytyy ainoastaan ostaa vuosittain päivitettävä osoitekirja. Isännät eivät veloita sinua asumisesta, ainoa ennakkoehto on että puhut esperantoa, niinkuin isännätkin.

UEA plendas ĉe Eŭropa mediatoro Jacob Soderman kontraŭ lingva diskriminacio en internaciaj organizoj

Eŭropaj organizoj rezervas pli kaj pli da postenoj, oficiale malfermitaj al ĉiuj civitanoj, al denaskaj parolantoj de la angla. Nur tiuj homoj, kiuj denaske scipovas la anglan, ĉu apartenantaj al sociaj elitoj, ĉu apartenantaj al anglalingvaj nacioj kaj landoj, povas kandidatiĝi por multaj postenoj Eŭropaj kaj en internaciaj organizoj. "Ni nun havas liston de 400 diskriminaciaj dunganoncoj fare de Eŭropaj organizoj kaj firmaoj en Bruselo. En la tuta mondo estas multe pli da tiaspecaj anoncoj," klarigas Renato Corsetti (la prezidanto de UEA).

Eŭropa Komisiono agnoskas la juran problemon. "Postuli denaskan scipovon de la angla povas esti konsiderata kiel diskriminacia," opinias Anna Diamantopoulou, membro de Eŭropa Komisiono respondeca pri laboro kaj egalaj ŝancoj. Respondante al demando de itala Eŭropa parlamentano Vitaliano Gemelli, ankaŭ membro de Eŭropa Komisiono Viviane Reding, respondeca pri kulturo kaj edukado, agnoskis kazon de lingva diskriminacio ĉe la Komisiona oficejo por la Eŭropa programo Sokrates, Leonardo kaj Junularo. Laŭ UEA, lingva diskriminacio estas grava atako kontraŭ la dua artikolo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

UEA bedaŭras ke Eŭropa Komisiono ĝis nun oficiale nur agnoskas respondecon por Teknikaj Helpoficejoj, organizoj rekte dependaj de la Komisiono. "Tamen Eŭropa Komisiono financas amason da Eŭropaj organizoj kiuj regule dunganoncas nur por denaskaj parolantoj de la angla." Ekde du jaroj, UEA kune kun Eŭropa Esperanto-Unio (www.lingvo.org) sekvas lingvan diskriminacion ĉe internaciaj organizoj kaj firmaoj. Multaj dunganoncoj por denaskaj parolantoj de la angla estas faritaj de Eŭropaj organizoj financitaj plene aŭ parte de Eŭropa Komisiono. Preskaŭ neniam aperas dunganoncoj por

denaskaj parolantoj de aliaj lingvoj.

"Spite al multaj neoficialaj plendoj en la Eŭropa Parlamento, Eŭropa Komisiono ankoraŭ financas amason de Eŭropaj organizoj en Bruselo, kiuj rezervas postenojn por denaskaj parolantoj de la angla," diras Corsetti. "Ekde la komenco de la jaro kvindek de gravaj Eŭropaj organizoj rezervis postenojn por denaskaj parolantoj de la angla. Inter ili estas eĉ oficiala servo de Eŭropa Komisiono – la projekto "Jean Monnet" kiu promocias la Eŭropan "spiriton" ĉe universitatoj."

Pasintjare, dum la Eŭropa Jaro de Lingvoj, klare sonis kondamnoj de lingva diskriminacio, interalie de la belga ministrino Laurette Onkelinx, respondeca pri egalŝancoj, kaj diversaj anoj de Eŭropa Komisiono (listo de parlamentaj demandoj). Tamen la praktiko daŭras en 2002 kaj Eŭropa Komisiono daŭre financas tiajn organizojn en Bruselo, kiuj rezervas postenojn por denaskaj parolantoj de la angla. Nun la prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, prof. Renato Corsetti oficiale plendas pri lingva diskriminacio al la Eŭropa Mediatoro, Jacob Soderman (www.euro-ombudsman.eu.int). "La ĉefa celo de la oficiala plendo estas kontraŭi diskriminacion surbaze de la denaska lingvo fare de internaciaj organizoj, t.e. la postulo ke kandidatoj denaske scipovu la anglan."

"Multaj politikistoj ne volas neŭtralajn kaj egalajn solvojn kiel, ekzemple, Esperanton. Tamen ili devas respondi al kaj respondi pri la kreskanta problemo de lingva diskriminacio kontraŭ nedenskaj parolantoj de la angla," klarigas Corsetti. Li tute ne estas kontenta ankaŭ pri la lasta respondo E-3572/01 de Anna Diamantopoulou, ano de Eŭropa Komisiono respondeca pri sociaj aferoj. "Ĝi nun permesas al Eŭropaj organizoj postuli "English mother tongue or equivalent" (La angla denaske aŭ samnivele).

Kompreneble, tio estas la samo kaj fakte signifas, ke Eŭropaj organizoj nun nur invitos denaskajn parolantojn de la angla.”

La plendo pri lingva diskriminacio fare de Universala Esperanto-Asocio celas ke la Eŭropa Komisiono:

1) agnosku la diskriminacian naturon de diverstipaj dunganoncoj, kiuj estas oficiale malfermataj al ĉiuj civitanoj, sed neoficiale rezervataj al denaskaj parolantoj de la angla [“English mother tongue”, “English native speaker”, “English mother tongue or equivalent”, ktp].

2) certigu ke ĝi ne plu financos tiujn organizojn kaj firmaojn, kiuj diskriminacias kontraŭ nedenskaj parolantoj de la angla.

3) studu kaj esploru rimedojn kaj metodojn eviti lingvan diskriminacion fare de organizoj plene kaj parte financitaj de ĝi.

La oficiala plendo ĉe la Eŭropa Mediatoro rilatas nur al tiuj dunganoncoj, kiuj postulas denaskan scipovon de la angla. “Tamen eĉ pli da Eŭropaj organizoj, kaj centoj da firmaoj laborante kun Eŭropa Komisiono en Bruselo, postulas “perfektan” scipovon de la angla kaj poste nur invitas denaskajn parolantojn de la lingvo de Ŝekspiro,” klarigas Corsetti. Eŭropa Komisiono ankoraŭ insistas ke lingva diskriminacio fare de Eŭropaj organizoj, eĉ se plene financataj de Eŭropa Komisiono, estas “nur” belga problemo pro tio ke Eŭropaj organizoj kaj firmaoj estas konstituataj laŭ belgaj leĝoj. “Oficistoj ĉe Eŭropa Komisiono bone komprenas ke belgaj inspektoroj havas nek monon nek tempon por solvi la problemon de lingva diskriminacio fare de Eŭropaj organizoj en Bruselo.”

Por pli da informoj, listo kaj ekzemploj de dunganoncoj bv. kontakti:

Dafydd ap Fergus,
Komunikadcentro de Eŭropa Esperanto-Unio
(www.lingvo.org; kontakt@lingvo.org)

*en Gazetaraj Komunikoj de UEA
la 25an de aprilo 2002*

Informi la neesperantistan gazetaron kaj neesperantistojn ĝenerale

“Mi ne estas informisto, estas mi esperantisto”. Tiel proksimume diras multaj esperantistoj. Aliflanke, kiel ni scias, la muroj de miljaroj falos kaj la neŭtrala lingva fundamento ekestos nur per laboro de la esperantoj.

Tion per pli modernaj vortoj diras ankaŭ la nun valida labor-plano de UEA, kiu aparte emfazas informadon.

Mi volas per ĉi tiu mallonga teksto prezenti al vi sperton, kiu povus esti ĝeneraligata.

En Italujo ekzistas eksterdordina esperantisto, Ĝorĝo Bronceti (Giorgio Bronzetti), kiu opinias, ke malmultaj lernas Esperanton simple ĉar neniu parolas al ili pri ĝi. Ĉefe la ĵurnaloj daŭre parolas nur pri la angla kaj la neceso lerni la anglan. Nu – Ĝorĝo diris iun tagon – kial ni ne starigas sistemon por disdoni informojn al la gazetaro en la nacia lingvo pri lingvaj problemoj kaj pri Esperanto?

Ĉar li apartenas al tiu speco de esperantistoj, kiuj ne atendas, ke aliaj faru, sed faras mem, li komencis puŝi siajn geamikojn starigi la sistemon, kaj nun la sistemo en Italujo funkcias. Ĝia nomo estas “disvastigo” (ĝuste tiel en Esperanto), kaj ĝi ne nur donas informojn al la gazetoj, sed ankaŭ al la parlamentanoj. Ĝi kunlaboras kun la Komunikad-Centro en Bruselo, kaj tiel multe pli.

Ĝorĝo evidente ĉerpas siajn informojn el pluraj fontoj kaj el pluraj listoj, interalie el e-inf@yahoogroups.com, kiu liveras tiajn tradukeblajn informojn al ĉiuj esperantistoj.

Mi scias ke kelkaj landoj havas propran sistemon similan, sed estus bele, se multaj landoj celus starigi similan sistemon. Ĝorĝo pravas pri tio, ke neniu lernos Esperanton, se neniu parolos al la publiko pri lingvaj problemoj kaj Esperanto. Ĉar neniu potenca grupo volas fari tion, eble ni mem faru kiel Ĝorĝo.

Renato Corsetti

Universalaj kongresoj 2002-2003

UK okazos en 2002 en Fortalezo, Brazilo, en 2003 en Gotenburgo, Svedujo, en 2004 en Pekino, Ĉinujo kaj 2005 en Vilnius, Litovujo.

La Internaciaj Junulara Kongresoj okazos en 2002 en Brazilo kaj en 2003 versajne en Svedujo (la plano por IJK 2002 en Litovujo nulĝis). (*amr*)

La estraro longigis kontraktojn

La estraro de UEA kunsidis meze de majo. Tiam ĝi surbaze de propono de la oficeja komisiono (Humphrey Tonkin, Ivo Osibov, Ans Bakker kun Marko Lins de TEJO-estraro) decidis nomi Trevor Steele ĝenerala direktoro por la periodo ĝis la 31-a de aŭgusto 2005-a. Sekve la antaŭvidita serĉo por tiu posteno ne estas necesa.

Same, surbaze de propono de la oficeja komisiono la estraro decidis elekti Stano Marĉek redaktoro de la jarkolekto de la jaro 2003-a de la revuo de la asocio. (*amr*)

Vielä vapaita paikkoja Valamossa!

Ilmoittautumisaikaa Valamon kursseille on kesäkuun 15. päivään saakka, ja senkin jälkeen kannattaa kysyä paikkoja. Etenkin aloittelijaryhmissä on vielä tilaa. Nyt kannattaa innostaa naapureitakin osallistumaan.

Nuorille houkuttimena toimii mahdollisuus osallistua Euroscola-en-Esperanto-matkaan keväällä 2004 ja kaikenikäisille hyvä syy on ensi kesän maailmankongressi Ruotsissa.

Myös ELFIN järjestämään seminaariin 5-7.7. mahtuu vielä. Seminaarissa pohdimme miten parhaiten saadaan oppilaat innostumaan. Voit osallistua seminaariin vaikka et opetakaan. Ilmoittaudu kuten kursseille.

Oppijan ja opettajan tietopankki

Esperantic Studies Foundation on kerännyt eri kielisiä esperanton oppikirjoja, verkkokursseja (katalogo de lerniloj), ja harjoituksia ratkaisuihin (lerniloteko) osoitteeseen <www.edukado.net> ja laajentaa tietokantaansa yhä. Yhteydenotot ja kaikki opiskeluun liittyvä tieto ja keskustelu on tässä osoitteessa maksutonta. Kirjat esitellään perusteellisesti: ulkoasu, koko, kuvitus, hinta, saatavuus, kieliopin ja sanaston laajuus, mille ikäryhmälle tai tasolle kirja sopii, ja onpa monien kohdalla myös käyttäjien suosituksia ja mielipiteitä. Kirjojen määrä kasvaa sitä mukaa kuin kirjojen tekijät lähettävät kirjojaan työryhmälle analysoitaviksi, ja harjoitusten ja testien määrä (lerniloteko) kasvaa sitä mukaa kuin opettajat itse lähettävät omiaan yhteiseen käyttöön. Edukado.netissä on myös Pedagogia informejo, jossa on tietoja kansainvälisistä esperantotutkinnoista ja ilmoituksia kursseista ja opettajista, jotka tarjoavat palveluksiaan kurssien järjestäjille. Vierailkaa toki edukado.netissä ja jättäkää nimenne vieraskirjaan. Linkittäkää edukado.net omiin osoitteisiinne. Siten parhaiten kiitämme työryhmää, johon kuuluu Katalin Kovac (Smideliusz), Håkan Lundberg, Mihil Meeuwissen, Nastja Kojevnikova ja Ralf Gion Fröhlich. He ovat tehneet ja tekevät kovasti töitä helpottaakseen esperanton oppijoiden ja opettajien ponnistelua.

Saliko

Seuraava Euroscola-matka keväällä 2004

Tämän kevään Euroscola-en-Esperanto antoi hyviä kokemuksia tulevaisuutta ajatellen. Turistijakso Pariisissa ja valmistautumispäivä Strasburgissa ennen varsinaista Euroscola-tapahtumaa kuuluneet tulevaisuudessakin ohjelmaan. Kuitenkin selvisi että puoli vuotta on liian lyhyt aika oppia esperantoa riittävän hyvin,

joten seuraava matka Suomesta järjestetään vasta keväällä 2004.

Kannattaa nyt jo oppia esperanton alkeet, joko Valamosssa tai muualla.

Salon Esperanto-seura järjestää syksyllä alkeiskurssin Salossa (12.10 ja 19.10) kaikenikäisille. ELFIn alkeiskurssi Kemiössä (22-24.11) on pääasiallisesti suunnattu 14-16-vuotiaille, jotka aikovat osallistua Euroscolaan 2004. Molemmista kurseista antaa lisätietoja kurssien opettaja Carola Antskog (050-5817272).

LIRO-2002

“La Ondo de Esperanto” invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en tradicia literatura konkurso Liro-2002.



Regularo

Liro-2002 havas kvin branĉojn.

1. Originala prozo: ne pli ol 30 mil literojn longa
2. Originala poezio: la amplekso ne estas limigita
3. Traduka poezio el la rusa lingvo: “Rastoĉitelj” de Fjodor Sologub
4. Traduka prozo el la rusa lingvo: “Tamanj” de Mihail Lermontov.
5. Traduka prozo el la angla lingvo: “The Lost Sanjak” de Saki.

En ĉiu el la originalaj konkursoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Bonvolu sendi tri tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ tre klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de Liro-2002 (RU-236039 Kalinigrad, ab. ja. 1248, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ 1 nov 2002.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo,

aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj jam estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukotaj verkoj petu ĉe la sekretario poŝte kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkuponno, aŭ elŝutu el la reto: <http://Esperanto.Org/Ondo>

La laŭreatoj de Liro-2002 ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago. La organizantoj rezervas al si la rajton ĝis 31 dec 2004 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en “La Ondo de Esperanto”, libroforme kaj elektronike, kondiĉe ke ili avertos pri tio la aŭtoron ĝis 1 mar 2003.

[Halina Gorecka]

La familia ensemblo Asorti vizitas Finnlandon

Edvard kaj Elena de la familia ensemblo Asorti, konata interalie de la UK en Tampere, vizitos ĉi-somere Finnlandon. La alventago estos ĉirkaŭ la 15a de junio ĉe Esperanto de Börje Eriksson en Luhtikylä proksime al Lahti. Ili venas el Litovio, urbo Visaginas. La celo de la rondvojaĝo estas kolekti informojn pri E-organizoj en landoj proksimaj de Svedio (lando de UK 2003), kaj aranĝi video-TTT-ejon, kie oni povos trovi informojn pri E-kluboj.

Pri la muzikaj prezentoj: Elena kaj Edvard ofte ludas dum diversaj E-festoj. La lastaj estis Sveda kongreso (Helsinborg 2000), 38-aj Baltaj Esperantaj Tagoj (Kaunas 2001) kaj Eŭropo – nia domo (Pollando-Ĉeĥio 2001). Ili estas konataj ankaŭ pro siaj koncertoj kun la filo Edgar.

En la repertuaro estas Esperantaj kantoj, originale verkitaj de Elena kaj Edvard kaj tradukitaj el litova kaj rusa lingvo. Ili uzas distran akompanadon helpe de teknikaparato kaj ĝenerale ludas per gitaro, elektronika piano, akordiono. Aparataron por malgrandaj salonoj (150-250 m²) ili povas mem kunporti.

Ruse kaj litove ili kutimas ludi dum edziĝfest-

oj, urbaj festoj kaj baloj diversspecan muzikon ekde folkloro ĝis elektronika dancstilo.

La ensemblo laboro estas ilia unua kromlaboro. Samtempe ili kunlaboras kun loka televido, kiel sonreĝisoro (Edvard) kaj videomuntistino (Elena). Tio ne estas konstanta laboro, nur lige al specialaj mendoj de urbestro.

Ilia baza laboro, ĉiutage, estas gvido de junulara muzikstudio, kiu estas parto de Junulara Kulturdomo ŝtata, kie laboras 50 junularaj studioj, kiel ilia, kie oni okupiĝas pri dancoj, kudrado, pentrado k.t.p.

Ĉiu studio havas lokajn kaj eksterlandajn kontaktojn kun aliaj similaj organizoj por ŝanĝi materialojn, vizitojn, koncertojn, laborojn ...

“Ekzemple, nia studio amikas kun Latvia muzikstudio, tre kvalita, kiu partoprenas diversajn eksterlandajn konkursojn, ni kune vojaĝis al eksterlandaj muzikfestivaloj, eldonis komunajn kompaktdiskojn, ofte reciproke vojaĝas.

Ni serĉas kontaktojn kun muziklernejoj, aŭ studio, kun la celo aranĝi komunajn koncertojn en Litovio, Latvio, Pollando kaj Ĉeĥio, kaj serĉas konstantan partneron por longatempa komunikado (videoklipoj, eldonado de KD, vojaĝoj).

Ekzemple, en aŭgusto ni kun multaj junularensembloj faros muziktendaron, kaj fine de ĝi elpaŝos dum Country-festivalo. Similajn projektojn en diversaj urboj ni faras ĉiujare somere, aŭ dum aliaj ferioj.”

En Finnlando la ensemblo planas pasigi eble du monatojn. Ili volonte havos kontaktojn kun esperantistoj de la tuta lando. Vi povas kontakti ilin pere de Börje Eriksson, Keiturintie 274, 16510 Luhtikylä, (03) 785 1191, <esperarto@dlc.fi>. La retadreso de la ensemblo estas <asorti@tts.lt> kaj ilia TTTejo <<http://tts.lt/~asorti/>>

Ne sendu inkon!

Laŭ sciigoj venintaj de la redaktoro de Pola Radio, s-ro Sadowski estas nefidinda inkopetanto. Ne kontaktigu kun li. Mi bedaŭras, ke kelkaj el ni jam perdis monon pro li.

Raita Pyhälä

Esperanto-kurssit Valamon kansan- opistossa 1.-5.7.2002

Valamon esperantokurseista on ollut tietoja jo kahdessa edellisessä numerossa. Tässä tämänvuotisen kurssin ohjelma (muutokset mahdollisia). Alkeiskurssin oppikirjana käytetään Lars Forsmanin Esperanton alkeiskurssi -kirjaa, jonka saa ostaa opettajalta (hinta 8,50 •).

Päivittäinen ohjelma

Ma 1.7.2002

- 9.00 Kurssin avaus, opettajien ja opiskelijoiden esittäytyminen; Kunkin kurssiryhmän avaus (alkeet, jatko, keskustelu)
- 10.00 Kiertokävely luostarin alueella ja tutustuminen sen toimintaan
- 12.00 Lounastauko
- 13.30 Alkeiskurssi (Sylvia Hämäläinen) /
Jatkokurssi (Atilio Orellana Rojas) /
Keskustelukurssi (oma ryhmä) 2 oppituntia
- 15.00 Kahvitauko
- 16.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 2 oppituntia
- 18.00 Tauko
- 18.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja
Keskustelu yhdessä 1 oppitunti
- 19.30 Iltatee, tutustumisilta

Ti 2.7.2002

- 7.00-9.00 Aamiainen
- 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
- 12.00 Lounastauko
- 13.30 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 1 oppitunti
- 14.15 Tauko
- 15.15 Laivaristeily Taivallahden kanavalle
M/S Sergeillä (erillinen maksu)
- 17.30 Kahvi
- 18.00 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja
Keskustelu yhdessä 1 oppitunti

18.45 Tauko
 19.30 Iltatee, yhteistä ohjelmaa
 19.30-22.00 Saunomismahdollisuus

Ke 3.7.2002

7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.
 13.30 Vaellus matkamiehen ristille, jossa kahvit (viedään mukana)
 16.00 Tauko
 17.00 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 2 oppituntia
 18.30 Tauko
 19.00 Iltatee
 19.30 Saunailta rantasaunalla (halukkaille, erillinen maksu) makkaraa, virvokkeita.

To 4.7.2002

7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.
 13.30 Luontoretki rukousmetsäpolulle ja luostarin hautausmaalle.
 16.00 Kahvi
 17.00 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 1 oppitunti
 18.00 Tauko
 18.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 1 oppitunti
 19.30 Slaavilainen ilta (juhlaillallinen), yhteistä ohjelmaa

Pe 5.7.2002

7.00-9.00 Aamiainen
 9.00 Alkeet/Jatko/Keskustelu (omissa ryhmissä) 3 oppituntia
 12.00 Lounastauko.
 13.30 Alkeet (oma ryhmä) / Jatko ja Keskustelu yhdessä 2 oppituntia
 15.30 Kahvi. Kurssin päätös

17.30 Suomen Esperanto-opettajien liiton ELFIN viikonloppukurssi esperantoa opettaville alkaa. Kurssi päättyy sunnuntaina 7.7. klo 16.00.

Päivittäin mahdollista osallistua kiinnostuksen mukaan jumalanpalveluksiin aamulla, päivällä ja illalla taukojen yhteydessä.

Ilmoittautuminen suoraan Valamon kansanopistoon 79850 Uusi-Valamo, puh: (017)570 1400, fax: (017)5701402 sähköposti: <valamon.kansanopisto@valamo.fi> Muista ilmoittautuessasi mainita mille kurssitasolla ajattelit osallistua.

Lisätietoja Suomen Esperantoliiton kautta, yhdyshenkilö Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku, puh: (02)2305319, <sekretario@esperanto.fi>

TERVETULOA!

Esperanto-kursojen Civitana Instituto de Valamo 1.-5.7.2002

Pri la kursoj jam estis informoj en la antaŭaj numeroj de Esperantolehti. Jen la taga programo por tiu ĉi jaro (ŝanĝoj eblas):

Taga programo

Lundo 1.7.2002

9.00 Malfermo de la kurso, la instruistoj kaj gelernantoj prezentas sin; Komenco por ĉiu lernogrupa (elementa, daŭriga, perfekta)
 10.00 Rondirado en ĉirkuaĵo de la monaĥejo kaj konatiĝo kun ĝi
 12.00 Lunĉopaŭzo
 13.30 Elementa kurso (Sylvia Hämäläinen) / Daŭriga kurso (Atilio Orellana Rojas) / Konversacia grupo (en propra grupo) 2 lecionoj
 15.00 Kafo
 16.00 Elementa/Daŭriga/Konversacia (en propraj grupoj) 2 lecionoj

18.00 Paŭzo
18.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj
konversacia kune 1 leciono
19.30 Vespera teo, interkona vespero

Mardo 2.7.2002

7.00-9.00 Matenmanĝo
9.00 Elementa/Daŭriga/Konversacia (en
propraj grupoj) 3 lecionoj
12.00 Lunĉopaŭzo
13.30 Elementa/Daŭriga/Konversacia (en
propraj grupoj) 1 leciono
14.15 Paŭzo
15.15 Ŝipkrozado en najbara lago ĝis la kanalo
kaj reen (aparta pago)
17.30 Kafo
18.00 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj
Konversacia kune 1 leciono
18.45 Paŭzo
19.30 Vespera teo, komuna programo
19.30-22.00 Ebleco saŭni

Merkredo 3.7.2002

7.00-9.00 Matenmanĝo
9.00 Elementa/Daŭriga/Konversacia (en
propraj grupoj) 3 lecionoj
12.00 Lunĉopaŭzo
13.30 Migrado al la kruco de la migranto, kie
komuna kafumado
16.00 Paŭzo
17.00 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj
Konversacia (kune) 2 lecionoj
18.30 Paŭzo
19.00 Vespera teo
19.30 Saŭna vespero en la lagborda saŭno
(aparta pago), kolbasoj, trinkaĵoj

Ĵaŭdo 4.7.2002

7.00-9.00 Matenmanĝo
9.00 Elementa/Daŭriga/Konversacia (en
propraj grupoj) 3 lecionoj
12.00 Lunĉopaŭzo
13.30 Ekskurso en naturo al arbara preĝa pado
kaj monaĥeja tombejo

16.00 Kafo
17.00 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj
Konversacia (kune) 1 leciono
18.00 Tauko
18.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj
Konversacia (kune) 1 leciono
19.30 Festa vespero en slava stilo (festa
vespermanĝo), komuna programo

Vendredo 5.7.2002

7.00-9.00 Matenmanĝo
9.00 Elementa/Daŭriga/Konversacia (en
propraj grupoj) 3 lecionoj
12.00 Lunĉopaŭzo
13.30 Elementa (propra grupo) / Daŭriga kaj
Konversacia (kune) 2 lecionoj
15.15 Fermo de la kursosemajno (ĉiuj kune)
15.30 Kafo
17.30 Semajnfina kurso de ELFI por
Esperanto-instruantoj komenciĝas. La
kurso finiĝas dimanĉe 7.7. je 16.00.

Ĉiutage ebleco laŭ intereso viziti ortodoksan di-
servon matene, tage kaj vespere dum la paŭzoj.

Por eksterlandanoj aliĝo pere de Esperanto-Aso-
cio de Finnlando, Siltasaarenkatu 15 C 65,
00430 Helsinki, Finnlando. Kontaktulo: Tiina
Oittinen, Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku,
Finnlando, tel: (02)2305319, <[sekretario@
esperanto.fi](mailto:sekretario@esperanto.fi)>. Memoru indiki la kursnivelon.

Esperanto-societo en Turku

La printempa ekskurso de EST bone sukcesis.
Ni vidis orlavadon sur la korto de ges-roj Kan-
nisto kaj ĝuis babilante bongustaĵojn en la kafe-
tablo. Dankon al Marjatta kaj Reijo! Nia sekva
renkontiĝo en aŭgusto estos vizito al la ekspozici-
cio de Sigrid Schauman en la Arta Muzeo de
Turku. Pli detalaj informoj venos en Informilo.
Dum la somero ni alvokos renkontiĝon, se venos
interesaj gastoj. Memoru la somerajn kursojn en
Valamo!

Bonan someron al ĉiuj! EST-estraro

Aŭtunaj Tagoj de Esperanto-Asocio en Finnlando en Taivalkoski 21.-22.9.2002

"Pensu globe – agu loke!"

Bonvenon al Taivalkoski!

Aŭtunaj Tagoj de EAF (21.-22.9.2002) invitas al loko, kiun malmultaj konus, se ĝi ne estus la naskiĝloko de verkisto Kalle Päätalo (1919-2000), kiu priskribas ĝin en siaj romanoj. Temas pri Taivalkoski, komunumo en Norda Finnlando kun ĉ. 5000 loĝantoj. Sur la aŭtovojo Oulu-Kuusamo ĝi troviĝas 154 km oriente de Oulu kaj 64 km okcidente de Kuusamo.

Finnaj esperantistoj konas la nomon de Taivalkoski pro la agado de Aini Vääränie-mi, kiu gvidas grupon en sia vilaĝo Metsäkylä. Tie ŝi inaŭguris eĉ Arbaron de Zamenhof, kie vizitantoj de pluraj landoj nomis arbojn laŭ siaj landoj. Laŭ ŝia iniciato la fabelkonkurso de Päätalo-instituto havas

ekde 2000 Esperanto-branĉon, kiun UEA aŭspicias. Pro tiuj atingoj EAF ĵus premiis Aini per la titolo Aganto de la Jaro 2001.

Unuopaj esperantistoj estis en Taivalkoski jam pli frue. Laŭ mapo aperinta en Esperanta Finnlando en 1920 la revuo havis tie unu abonanton, kies nomon oni tamen ne sukcesis malkovri ĝis nun. La retejon de Taivalkoski vi trovas ĉe *www.taivalkoski.fi*

Programo

Nia temo "Pensu globe – agu loke!" memorigas nin pri la grava rolo de loka agado por atingo de tutglobaj celoj.

Ĉi-foje la Aŭtunaj Tagoj estos "moviĝanta" evento. La bazo estos Hotelo Taivalvaara, kie troviĝas ankaŭ Päätalo-instituto, kiun



*Taivalkoskianoj
prezentas inviton
al Aŭtunaj Tagoj.
(Foto: Pentti
Makkonen)*



Hotelo Taivalvaara.

nun gvidas Osmo Buller (vidu intervjuon kun li ĉi-numere). La unua tago tamen ĉefe okazos aliloke pro multhora ekskurso. Ni vizitos la feriejon Saija kaj Kallioniemi, la infanaĝan domon de Kalle Päätalo. La tagon ni finos en Metsäkylä, kie troviĝas la plej norda Esperantlingva vilaĝvendejo Metsäkylän Kyläkauppa kaj trinkejo Arbar-Bar.

Ni konatiĝos kun la vivo kaj verkoj de Kalle Päätalo kaj ĝuos la rikolton de la fabelkonkursoj. Ni rigardos ankaŭ la filmon "Reveno al Finnlando", kiu rakontas pri la severa vivo de militkaptitoj dum konstruado de fervojo tra Taivalkoski en la dua mondmilito. Krome la estraro de EAF instigos la par-

toprenantojn diskuti pri loka Esperantoagado.

La akceptejoj malfermiĝos en hotelo Taivalvaara je la 10a horo sabate. Aŭtunaj Tagoj finiĝos en la vendejo-kafejo Jalava ĉ. la 15a horo dimanĉe. Pli detala programo aperos en la sekva numero, en la retejo <www.esperanto.fi> kaj en la retlisto EAF-agadas.

Loĝado kaj manĝado

La amasloĝejo estas en la vilaĝo Metsäkylä. Ĝi estas organizita speciale por FEJOanoj. La kvarpersonaj ĉambroj estas en la feriejo Saija. La ceteraj ĉambroj estas en hotelo Taivalvaara. Ni manĝos en malsamaj lokoj

lige al la programo, en la feriejo Saija, en domo Halkola en Metsäkylä kaj en vendejo-kafejo Jalava.

Transporto

Grupa trajnvojaĝo de suda Finnlando estas organizata: vendrede ni per nokta trajno, kiu atingos Oulu je 7.46 (starto de Turkuo 21.10, Helsinko 22.30, de Tampere 1.18); dimanĉe de Oulu je 17.23 (alveno en Tampere 21.59, Turkuo je 23.50, Helsinko je 23.56). La horaro ankoraŭ devas esti konfirmita. Por pliaj informoj kontaktu kun Tiina Oittinen! Bv. laŭeble baldaŭ indiki vian intereson pri la komuna vojaĝo! Tio helpas la planadon.

EAF ofertas la eblecon partopreni en komuna busa transporto Oulu-Taivalkoski sabato matene kaj Taivalkoski-Oulu dimanĉo posttagmeze je la kosto de 40 eŭroj. Bv. indiki vian interesigon pri tiu ĉi ebleco en la aliĝilo!

Pri aliaj eblecoj atingi Taivalkoski povas konsili nia loka kontaktpersono Aini Vääräniemi.

La moviĝanta AT-programo postulos ankaŭ transportojn en Taivalkoski, sed por ili vi ne devos krompagi. Tiuj kostoj estas inkluzivitaj en la partoprenkotizo.

Kontaktinformoj

Loka kontaktpersono: Aini Vääräniemi, Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala, (040) 518 7242, <aini.vaaraniemi@pp.inet.fi>

Respondeculo pri la trajnvojaĝo de suda Finnlando: Tiina Oittinen, Puutarhakatu 26 A, 20140 Turku, (02) 230 5319, (050) 549 4709, <sekretario@esperanto.fi>

Se vi havas proponojn por la programo vi ankaŭ povas kontakti la prezidanton de EAF (kontaktinformojn p. 2).

Kontaktinformoj por Hotelo Taivalvaara: Taivalvaarantie, tel. (08) 841 661.

Aliĝilo Mi aliĝas al la Aŭtunaj Tagoj de EAF 21.-22.9.2002

Nomo _____

Adreso _____

Tel./Fakso/Ret-adreso _____

Aliĝkotizo:

ĝis la 15.7. 12 •

ĝis la 15.8. 16 •

ekde 15.8. kaj surloke 20 •

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Senpage infanoj sub 15 jaroj kaj personoj loĝantaj ekster Finnlando.

La aliĝkotizo inkluzivas transportojn kaj vizitojn laŭ la programo.

Mi mendas la AT-paketon, inkluzivas tranokton laŭ elekto kaj manĝojn (2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo)

en amasloĝejo por FEJO-anoj 37 •

en kvarlita ĉambro 52 •

en trilita ĉambro 58 •

en dulita ĉambro 67 •

en unulita ĉambro 81 •

Mi mendas la manĝopaketon (2 lunĉoj, 2 kafoj, vespermanĝo) 27 •

Mi mendas bustransporton Oulu-Taivalkoski-Oulu 40 •

Mi pagos al la konto de EAF entute _____ eŭrojn.

Deziroj koncerne tranokton kaj manĝojn: _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65

FIN-00530 Helsinki

Pagoj al la konto: Sampo 800017-230825.

Bonvenon!

Ilmoittautumislomake

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton Syyspäiville 21.-22.9.2002

Nimi

Osoite

Puh./fax/sähköposti

Ilmoittautumismaksu:

- 15.7. saakka 12 •
- 15.8. saakka 16 •
- 15.8. jälkeen 20 •

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset ja Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt.

Ilmoittautumismaksu sisältää ohjelmanmukaiset kuljetukset ja vierailut.

Tilaan syyspäiväpaketin, sisältää valitun majoituksen, ruokailut (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala):

- 37 • (yhteismajoitus FEJO-laisille)
- 52 • (majoitus 4 hh:ssa)
- 58 • (majoitus 3 hh:ssa)
- 67 • (majoitus 2 hh:ssa)
- 81 • (majoitus 1 hh:ssa)

Tilaan ruokailupaketin (2 lounasta, 2 kahvia, iltapala) 27 •

Tilaan bussikuljetuksen Oulu-Taivalkoski-Oulu 40 •

Maksan EAF:n tilille yhteensä _____ euroa.

Toivomuksia majoituksen ja ruokailun suhteen

Lähetä ilmoittautumisesi osoitteella:

Suomen Esperantoliitto ry
Siltasaarenkatu 15 C 65
00530 Helsinki

Maksut EAF:n tilille: Sampo 800017-230825.

Tervetuloa!

La estraro kunvenis

La estraro kunsidis unuafoje tuj post la elektiĝo en Mikkeli la 24an de marto 2002 por elekti funkciulojn: Tiina Oittinen daŭrigas kiel sekretario. Päivi Saarinen estas nova vicprezidanto.

Duafoje la estaro kunsidis en la oficejo en Helsingo la 6an de aprilo 2002. La estaro elektis (aŭ konstatis la antaŭan elekton) la sekvajn funkciulojn kaj komisiitojn de la asocio:

- Jura konsilanto: Sakari Kauppinen
- Estraro de fonduso Propra Ejo: Sakari Kauppinen (EAF), Harri Laine, Irma Heikkilä
- Doma kompanio Siltasaarenkatu 15: Anna-Liisa Heikkinen

- Oficeja biblioteko: Ritva Sabelli
- Membroregistro kaj adresaro: Tapio Sormunen (tamen, laŭ peto de Tapio, ni ekserĉu postulon por la sekva jaro)

- Interreto: la rajtojn por ĝisdatigi la retpaĝojn havas por EAF Päivi Saarinen, Jukka Pietiläinen (prizorganto) kaj Jukka Vajjärvi, por EKH Sakari Kauppinen kaj por FEJO Patrik Austin. Jukka Noponen estas helpanto. Päivi Saarinen kunordigas la interretan laboron.

- Estraro de junulara fonduso: Anna Ritamäki (EAF), Hanna Helén (FEJO)

- Stipendioj: Päivi Saarinen
- Instruado kaj lernomaterialo, kontaktoj kun ELFI: Tiina Oittinen

- Valamo-grupo 2002: Tiina Oittinen (kunordiganto), Jukka Laaksonen, Synnöve Mynttinen, Carola Antskog (ELFI) kaj Sylvia Hämäläinen (instruisto)

- Movada historio de Finnlando: Anna Ritamäki (estrara kontaktulo)

- Nordia kunlabora komisiono: Anna Ritamäki

- Eŭropa agado: Anna Ritamäki
- Prelegvojaĝoj (turneoj): Tiina Oittinen
- Suomen YK-liitto (UN-asocio de Finnlando): Anna Ritamäki, Jukka Vajjärvi

- Vortara grupo: Jouko Lindstedt (ĉefredaktoro), Riitta Hämäläinen, Harri Laine, Raita

Pyhälä (redaktoroj por vortaj artikoloj). Mankas la teknika redaktoro, ĉar Matti Lahtinen lasis la taskon somere 2001. Flanke de la estraro Anna Ritamäki estas la kontaktulo kun la grupo.

– Esperanto-lehti, redakta grupo: Anna Ritamäki, Riitta Hämäläinen, Raita Pyhälä, Jukka Laaksonen, Aini Vääräniemi, Aimo Rantanen kaj Tiina Oittinen (sekretario de EAF) kaj Ilkka Santtila (teknika redaktoro). Mankas la ĉefredaktoro, ĉar Aimo Rantanen lasis la taskon post la unua numero ĉi-jare. La retadreso <esperantolehti@esperanto.fi> atingas nun la tutan grupon.

La estraro konstatis, ke la asocio havas jenajn regulojn kaj konsilojn:

- Statuto (säännöt)
- Administraj konsiloj (hallinnolliset ohjeet)
- Kontoregistro (tilikartta)
- Regularo pri retpoŝtaj decidoj
- Konsiloj pri EAF-stipendioj
- Statuto de Propra Ejo (toimitilarahaston säännöt)
- Statuto de Junulara Fonduso (Nuorisorahaston säännöt)

La estraro pritraktis la planojn por Aŭtunaj Tagoj 2002 en Taivalkoski. La laborgrupo de AT estas: Anna Ritamäki, Päivi Saarinen, Tiina Oittinen kaj Anna-Liisa Heikkinen de EAF-estraro kaj Aini Vääräniemi kaj Osmo Buller el Taivalkoski.

La estraro esprimis sin principe por la reokazigo de la kursoj en Valamo somere 2003.

La estraro kunsidis en la oficejo la 25an de majo 2002.

Inter la sciigoj la estraro konstatis i.a. ke:

- Jukka Vaijärvi reprezentis la asocion en la jarkunveno de UN-asocio de Finnlando la 25an de aprilo
- Riitta Hämäläinen reprezentis la asocion en kunveno de ENAR - European Network Against Racism (Eŭropa reto kontraŭ rasismo) en la kulturcentro Caisa la 26an de aprilo

Pri venontaj aranĝoj:

- la Valamo-grupo planis kunsidon en Tampere por la sekva tago
- Eero Rinta-Karjanmaa kontaktos aliajn Lahtianojn por esplori la eblecojn okazigi en Lahti Vintrajn Tagojn 2002
- la estraro esploros la eblecojn okazigi Aŭtunajn Tagojn 2003 en Raŭmo

EAF eldonos novan iom korektitan version de la lernolibro verkita de Lars Forsman kaj finnigita de Raita Pyhälä. EAF eldonos ankaŭ kasedojn por la libro.

EAF kunlaboros kun la eldonantoj de kuirlibro verkita de 15-jara Joakim Jormanainen. La eldonanto petis de EAF informojn pri tradukanto kaj Raita Pyhälä tradukis ĝin.

Päivi Saarinen kontaktos nome de la estraro kun Lasse Kivistö por ekscii pli pri la sorto de Mendoservo.

Venis unu stipendipeto. Ĝin sendis Anna Ritamäki, kiu petis 200 eŭrojn kiel subtenon por sia reprezentado de EAF en la UK en Fortaleza, kiel UEA komitatano A. (La antaŭa estraro petis pli grandan sumon de Fondumo Esperanto tiucele, sed la FE respondis nee konsiderante ke temis pri ordinara agado de la asocio.) Sub gvido de la vicprezidanto la estraro decidis favori la peton.

La estraro diskutis prioritatojn kaj eblecojn peti pliajn subvenciojn. Eventuale ankoraŭ dum tiu ĉi jaro EAF faros peton al Fondumo Esperanto. La peto al edukministrejo pri gazeta subvencio estis sendita, sed ne ankoraŭ alvenis informo pri decido.

La estraro legis la tekstoproponon de UEA kiu celas varbi novajn membrojn por Esperanto-asocioj kaj diskutis eblecojn kampanji tiucele en Finnlando.

Venis informo de Litovujo pri la plano de la ensemblo Asorti viziti Finnlandon. ▷

IJF en Fenestrelle, italaj Alpoj

Biciklado:

por mi ne sukceso, por Cirilo jes

Por tuj komence rakonti la plej malagrablan aferon pri mia vojaĝo al IJF (Internacia Junulara Festivalo): mi ne trovis luejon de bicikloj en Torino. Estas mirinde, se urbo tiom granda tute ne havas tion. Ĉe la fervoja stacio estis ejo, kie iam antaŭe oni luis biciklojn, sed anonco ĉe la pordo rakontis, kiun mia demando konfirmis: la luejo ne plu funkcias. Ili provis klarigi al mi vojon al iu alia ejo, kie oni eble luas biciklojn. Serĉante kaj demandante mi konstatis, ke la italoj scipovas la anglan malpli bone ol mi supozis, kaj ke mi parolas la italan pli bone ol mi kredis. Bicikloluejo nur neniam troviĝis.

Mi povis ankaŭ konstati, ke la itala trafiksis-temo ne favoras bicikladon. Biciklovojetoj apenaŭ ekzistas, kaj oni vidas nur malmultajn biciklantojn. Kaj la veturmaniero de italoj en aŭtoj ŝajnas egali la plej terurajn antaŭjuĝojn. La italaj piedirantoj estas neniam pli bonaj, sed piedirantoj estas danĝeraj plejparte por si mem, ne por aliaj.

La randmontoj de valo Chisone atingas en maksimumaj punktoj altecon proksime de 3000 metroj. Tio por mi, kiu antaŭe preskaŭ neniam estis en montaro (nur unu trajnveturo trans Alpoj en Aŭstrio), donis impresan sperton. Des pli bedaŭrinde, ke mi ne havis la biciklon kaj povis nur aspektante, ne biciklante, sperti la deklivojn.

Spertojn pri bicikla vojaĝado mi tamen ricevis en la IJF, ĉar mi havis plezuron aŭdi prelegon de Cirilo Pinardon, kiu ŝajnas bicikli eĉ pli entuziasme ol mi. Li venis ankaŭ al IJF el Francio bicikle. Lia prelego donis al mi plian kredon, ke biciklo estas bona rimedo vojaĝi ankaŭ eksterlande. Laŭ Cirilo senpaga libera tendumado, aŭ sovaĝa tendumado, kiel Cirilo diris, eblas praktike ĉie, kvankam ĝi en kelkaj landoj estas almenaŭ teorie malpermesita. Laŭ liaj spertoj biciklo estas bona bonvenigilo kien ajn, oni preskaŭ neniam estas malamikeca kontraŭ biciklanto.

Cirilo rakontis ankaŭ pri transportado de biciklo en trajnoj. Laŭ miaj spertoj kunportado de biciklo en trajno tra kaj Svedio kaj Baltio estas ege probleme, kio malfavoras mian eksterlandan vojaĝadon.

Naturo kiel finnlanda, sed sur vertikala grundo

Averaĝa temperaturo de jaro en la norda parto de Italio estas proksimume 12 gradoj. En suda Finnlando ĝi estas proksimume 4 gradoj. En atmosfero irante supren tamen la temperaturo kutime malvarmiĝas 2–6 gradoj po kilometro. Do estas fakte ne granda surprizo, ke la naturo ĉirkaŭ la ejo de IJF, en alteco de preskaŭ 2 kilometroj, tre similis la finnan, kvankam tio unue

Laŭ propono de Pentti Makkonen la estraro esploros ĉu eblus eldoni belan omaĝleteron (por kondolencoj aŭ/kaj gratuloj).

Pro informo de Osmo Buller kaj Jukka Pietiläinen la estraro decidis mendi unu novellibron kun la nomo “Esperanto” (laŭ la ĉefa novelo de la finnlingva kolekto) de Eero Suvilehto al la biblioteko de EAF. Tiel eblos konatiĝi kun tiu ĉi libro pri kies ekzisto ni antaŭe ne sciis.

La estraro diskutis la retpaĝojn de la asocio surbaze de propono verkita de Jukka Pietiläinen. Li, Päivi Saarinen kaj Jukka Noponen kunsidis en la oficejo la 15an de majo por diskuti pri la retpaĝoj.

La sekva kunsido okazos en la oficejo la 20an de julio je la 11a horo. La prezidanto esprimis deziron, ke estrarkunsido iam aŭtune povus okazi kune kun semajnfina seminario.



La festivalejo vidita de supre ĉe randmontoj de valo Chisone.

orientan landlimon jam plurfoje dum la malpli ol jarcenta memstareco. Ekde tio, ke la ŝtato de Italio en jaro 1860 formiĝis, ĝia limo kontraŭ Francio ĉiam sekvis la plej altajn pintojn de la montaro Alpoj.

Tamen ankaŭ sur la flankoj de montoj ekzistas regiono, kie lingvo kaj kulturo sanĝiĝas ne tute akurate, sed grado post grado. En tia regiono estas ankaŭ valo Chisone, kaj tie la komunumo Fenestrelle. La nomo de la komunumo tute taŭgas por italforma nomo, sed jam la nomoj de la subvilaĝoj montras apartenecon al ŝanĝiĝregiono inter Italio kaj Francio: la subvilaĝoj estas Mentoulles, Depot, Chambons, Puy, Granges, Pequerel, Champs kaj Villa Cloze. La loka lingvo estas dialekto de la okcitana, lingvo, kiun oni vaste parolas en suda Francio.

La nomo de Fenestrelle venas (verŝajne) de latinlingva esprimo *Finis terrae*, la fino de tero. Tiu eble ilustras tion, ke por homoj tiuj montaraj lokoj ĉiam estas la rando de la loĝebla tero, sed aliflanke la nomo ankaŭ havas la signifon, ke Fenestrelle iam estis la limo de antikva regno de Cozii.

Malpleniĝanta kamparo ankaŭ en Italio

Pri la vivo en montaro prelegis Carlo Bourlot, eksa loĝanto de montara vilaĝeto. Antaŭ kelkaj dekoj da jaroj oni ankoraŭ ne havis elektron kaj aŭtojn, ankaŭ ne vojon eblan por aŭtoveturado. La homoj estis kutimiĝitaj piediri distancojn de multaj kilometroj, pezajn objektojn oni portis per azeno.

La vivo estis naturproksima kaj bazita sur terkultivado. Bovinoj estis gravaj, oni faris buteron kaj fromaĝojn de ilia lakto. La homoj kolektis fojnon de la kampoj sur montoflankoj. Azeno povas porti tri faskojn da fojno kaj viro unu faskon, do kune kvar faskojn eblis porti foje. Unu

iom surprizis min. Sciante, ke jam en Estonio multas ekzemple fraksenoj kaj cikonioj, kiuj en Finnlando estas maloftaj, mi ne vere atendis, ke veturinte tra tuta Eŭropo mi tie renkontus la hejmecajn pinajn kaj piceajn arbarojn, en kiuj kantas la hejmecaj paruoj kaj turdoj. Sed la klimazono estas proksimume la sama. Pri arbaro tie malsamas proksimume nur, ke betuloj mankas, kaj larikoj multas.

Unu grava malsamo en la pejzaĝoj tamen estas. En Finnlando la tergrundo estas ekde horizontala ĝis deklivo kutime ne pli ol 30 gradoj. En Alpoj la grundo direktiĝas ekde 30-gradaj deklivoj ĝis vertikalaj krutaĵoj.

En kelkaj tagoj oni povis nur ete konatiĝi kun la montaro. La naturparko de Orsiera-Rocciavre, ĉe kiu la festivalejo estis, ampleksas 11 000 hektarojn, aŭ 110 kvadratkilometrojn. La neĝkovritaj montpintoj ornamas ne nur la naturparkon, sed la tutan ĉirkaŭon de la valo. Tiu ĉi pejzaĝo tamen estas parte minacata per la klimatsanĝiĝo. La loĝantoj de la montaraj vilaĝoj rakontis, ke nuntempe la vintroj estas multe malpli neĝaj ol antaŭ jardekoj. Varmiĝo ne degeligas la montojn mem, sed eble iliaj pintoj baldaŭ ne plu estas neĝkovritaj.

Rando de la mondo inter Italio kaj Francio

La limo de Italio kaj Francio estas per naturaj kialoj stabila, kompare kun ekzemple la limo inter Finnlando kaj Rusio. Ni ja ŝanĝis nian

La terasformaj kampoj apud montara vilaĝo estas ne plu kultivataj kaj arboj kreskas sur ili.

bovino manĝas en jaro proksimume 40 faskojn da fojno. Ankaŭ oni rikoltis terpomojn, grenon, kiu estis plejparte sekalo, kaj kelkajn fruktojn, kvankam la fruktoj ne tre bone kreskas en la malvarmo de montaro. Por kultivado de montaj deklivoj oni ofte bezonis konstrui terasajn kampojn. En Usseaŭ, najbara komunumo de Fenestrelle, ni vidis montdeklivon plenan de tiaj terasoj, ne plu tamen kultivataj.

La vilaĝoj kutime situas en la sudaj deklivoj de montoj, la nordaj deklivoj estas ne loĝataj. Nuntempe multaj eksaj vilaĝoj en la foraj partoj de la valoj estas ne plu loĝataj. Carlo Bourlot rakontis, ke la montaro tre rapide malpleniĝis de loĝantoj en la 1960-aj jaroj, kiam industria socio faris vivon en urboj alloga. Loĝado restis nur en la centraj partoj de la valoj, kie oni povis konstrui aŭtovojon, kaj ankaŭ tie la loĝantaro malmultiĝis. Ekzemple Usseaŭ havis loĝantojn iam pli ol 1000, nun 200. Sed ankaŭ en Italio pli kaj pli kutimiĝas, ke homoj loĝantaj en urboj havas ferioleĝejon, kaj tion ja multaj nun havas en montaraj vilaĝoj kiel Usseaŭ kaj Fenestrelle.

Por la vilaĝanoj la vivrimedo estas ne plu terkultivado, sed servado de turistoj. La kampoj ĉirkaŭ la montaraj vilaĝoj estas nun plejparte neuzataj, ankaŭ tiu apud Usseaŭ vidita terasaro jam estis plena de kreskantaj arboj. Malnova muelilo de Usseaŭ, kiu prenas movforton de akvo, nun funkcias denove, sed pli por turismaj kialoj ol por prilabori la grenon.

Tien per monoj de la ŝtato

Mi povas varme rekomendi al FEJO-anoj ankaŭ estonte malŝpari la monojn de la ministrejo pri edukado por partoprenado de IJF. Kvankam iuj



pro krokodilado ĝenitaj ŝercis, ke IJF vere signifas Itallingva Junulara Festivalo, do se oni ne volas lerni la italan, oni povas ĉiam provi devigi la italojn lerni Esperanton.

Kaj se komuna lingvo troviĝas, restas kelkaj kulturaj diferencoj malfaciligantaj kunestadon. Por mi ŝajnas, ke la italoj ne tre bone komprenas tipan finnan silentemon. Eble tial mi ĉiam sentas, ke mi pli rapide trovas funkciantan komunikadon kun aliaj nordiuloj, germanoj kaj svisoj ol kun sudeŭropanoj.

Nun estas ĉiuokaze tempo denove plani pri veturado al Baltaj Esperanto-Tagoj. Eble tien sukcesas biciklado.

Mikko Mäkitalo

Oulu

Esperanto-societo de Oulu daŭrigas siajn kun-sidojn ankaŭ dum la somero en la biblioteko sabate je la 12-a horo. Bonvenon!

✉ Korespondi deziras

Mi volas korespondi kun geesperantistoj de Finnlando. Mi estas komercisto, tre ŝatas vojaĝi kaj helpi aliajn homojn. Wang Mingbo, 40-a, loĝas en Nanxinglu59-1, Qiqihar-urbo de Ĉinio. <wangmin6523@sina.com>

Suomen esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset osoitteistoon Ilkka Santtilalle, Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki, s-posti ilkka.santtila@esperanto.fi mieluummin kirjallisena.

Suomen Esperantoliiton paikallisyhdistykset toimivat:

- ♦ Helsingissä: Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ Sakari Kauppinen, sakari@skau.pp.fi
- ♦ Iisalmessa: Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi
- ♦ Jyväskylässä: Jyväskylän Esperantokerho / Esperantoklubo de Jyväskylä, (Terttu Tyynelä) PL 136, 40101 Jyväskylä
- ♦ Lahdessa: Lahden Esperantokerho / Esperantoklubo de Lahti, (Martti Pennanen) Kalliomaankatu 10, 15150 Lahti. ☒ martti.pennanen@pp.phnet.fi
- ♦ Mikkelissä: Mikkelin Esperantokerho / Esperantoklubo de Mikkelä, (Elli Husso) Porrassalmenkatu 27 B 51, 50100 Mikkelä.
- ♦ Oulussa: Oulun Esperantoseura / Esperantosocieto de Oulu, (Allan Mehtonen) Valtatie 6-8 B 15, 90500 Oulu
- ♦ Salossa: Salon Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla ☒ matti.wallius@pp.inet.fi
- ♦ Tampereella: Esperantoseura Antaŭen ry. / Esperantosocieto Antaŭen, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. (Rainer Arvola, Kärjäntörmä 2 E 32, 33310 Tampere, ☒ andromeda@koti.tpo.fi)
- ♦ Turussa: Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku, (Tiina Oittinen) Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☒ tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Lappeenrannassa esperanton harrastajilla ei ole järjestöä, vaan "esperantoryhmä", jolle voi lähettää postia osoitteeseen (Irja Miettinen) Esperantogrupo de Lappeenranta, Yrjönkatu 6-8 A 1, 53600 Lappeenranta.

Lisäksi Suomen Esperantoliittoon kuuluu

- ♦ Suomen opettajain esperantoliitto / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Carola Antskog) Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☒ cantskog@kolumbus.fi. Tilinro: 800015-129185
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☒ fejo@esperanto.fi. Tilinro: 101130-227446
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☒ (09) 660 651

Useiden paikkakuntien puhelinluettelosta hakusanan "Esperanto" kohdalta löytyy paikallisten harrastajien puhelinnumeroita.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna **2002**
aperas dum la jaro

Nro	Red.grupo komencas	Limdato	Aperas
4	1.7	15.7	1.8
5	1.9	15.9	1.10
6	1.11	15.11	1.12

Avustajien toivotaan noudattavan edellä esitettyjä aikoja. La redakcio esperas, ke helpantoj atentu la datojn supre.

Ilmoitushinnat

Ulkopuoliset mainostajat:	Jäsenet:
1/1 sivu 600 mk	1/1 sivu 300 mk
1/2 sivua 400 mk	1/2 sivua 200 mk
1/4 sivua 250 mk	1/4 sivua 125 mk

Palautusosoite: Esperantoliitto
Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki

Muistathan...

Jäsenmaksulla mukaan FEJO:on!

FEJO:n jäsenmaksu vuonna 2002:

- alle 30-vuotiailta 10 •
- tukijäseniltä 13 •

Maksa jäsenmaksu FEJO:n tilille 101130-227446 (Merita). Ilmoita yhteystietosi ja syntymäaikasi sihteerille: Katja Lampinen, (040) 523 6076, <katja.lampinen@edu.stadia.fi>

FEJO:n jäsenenä pysyt menossa mukana. Varsinaiset jäsenet saavat Esperantolehden.

FEJO-membrokotizoj 2002:

- 10 •/ membro
- 13 •/ subtenanta membro

Kontonumero supre.

Postituslistalla ajan tasalla!

Parhaiten saat tietoa FEJO:n toiminnasta seuraamalla sähköpostilistaamme. Ohjeet liittymiseen löydät netistä osoitteesta <<http://groups.yahoo.com/group/fejo>>

Aliĝo al poŝtlisto de FEJO garantias, ke vi maltrafos nenion.

Nettisivuilta huvia ja hyötyä!

Linkkivinkkejä, kuvia, Diskejon loistava valikoima esperantolevyjä...

FEJO:n nettisivut osoitteessa <www.esperanto.fi/fejo>

Aliĝiloj, fotoj, Diskejo...

Konatiĝu kun la TTT-paĝoj de FEJO.

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy elokuun alussa. Jutut 15.7.2002 mennessä Anna Ritamäelle. Venonta numero aperos en la komenco de aŭgusto. Artikoloj ĝis 15.7.2002 al Anna Ritamäki. Osoite/adreso: Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito, puh/tel. (02) 423 146, s-posti/rete: <esperantolehti@esperanto.fi>.